

SVISA ESPERANTO - SOCIETO

INFORMAS

3/92

Koresp-adr: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich

Red-Telefona: 01/53 77 13

MAJO-JUNIO

ekde 6.5.92. 01/381 77 13

L SP R NTO KOM N MO

Kiel vi vidas, sen UEA la Esperanto-komunumo estus apenaŭ rekonebla. Ĝi perdus multon. Eĉ sian sencon.

Per membriĝo en UEA aŭ ĝia junulara sekcio TEJO, vi aliĝas al tutmonda reto de pli ol 8 000 individuoj kaj 100 landaj kaj fakaj asocioj. Viaj estas:

La kontaktoj...

La Jarlibro de UEA kaj la Pasporta Servo de TEJO malfermas al vi mondon sen limoj.

La eldonaĵoj...

La plej komplete Esperanta libroservo regalos vin en 1992 per sia renovigita katalogo de pli ol 3 000 libroj, kasedoj, vidbendoj kaj multe pli.


La kunlaboro...

La revuoj *Esperanto*, *TEJO-tutmonde* kaj *Kontakto* donas unike vastan perspektivon pri nia movado. Jen ĉio por efike aktivigi, inkluzive optimismon!

Ne manku al nia komunumo. Aliĝu al UEA.

Sendu viajn kompletajn nomojn kaj adresojn, profesion kaj naskiĝdaton kun via kotizco (vd. kotiztabelon sube) al via landa peranto:

S-ro Niklaus Weiss, Sagstrasse 20, 6300 Zug.



MA Membro-Abonanto (ricevas la Jarlibron kaj revuon *Esperanto*), 72 SF
MA-T Juna Membro-Abonanto (ĝis 29 jaroj – ricevas ankaŭ *Kontakto*-n), 72 SF
MJ Membro kun Jarlibro (ricevas la Jarlibron, sed ne la revuon), 29 SF
MJ-T Juna Membro kun Jarlibro (ĝis 29 jaroj – ricevas ankaŭ *Kontakto*-n), 29 SF
MG Membro kun Gvidlibro (minimuma kategorio), 12 SF
DM Dumviva Membro (ricevas la Jarlibron kaj revuon dum la tuta vivo), 1800 SF

GRUPAJ INFORMOJ

ESPERANTO-SOCIETO BERN:

En restoracio "AL FORNO" Spitalgasse 37

5.5.19.30h kaj 2.6.19.30h

ESPERANTOGRUPO "LA STELO" GENÈVE:

29.5.20.00h Post la studado en Esperanto:

1. "Esperantaj lecionoj inter avino kaj genepoj" laŭ tute natura, simpla metodo, pri ĉiutaga vivo. Prelegos Christiane Sixtus-Pot.
2. Annemarie Briner parolos pri: "Katinetoj babiladas en Esperanto kaj instruas la lingvon al sia mastrino, laŭ signifaj gestoj kaj mimikoj".

ESPERANTO-SOCIETO LAUSANNE:

24.5.([dimanĉo]) Ekskurso al monto Pelerin supre de Vevey, sub gvido de s-ro Virdaz.

LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO:

Ĉiun unuan merkredon de la monato (krom aŭgusto kaj oktobro) okazas paroliga kunveno de 14.00h-16.00h en rest. "Big Ben" Winkelriedstr.39. Gvidado: Franz Brügger.

14.5.([ĵaŭdo]) en rest. Simplon Habsburgerstr.16.
"NI LERNAS ĜUSTE BANDAĜI". Gvidas Margrit Scherer.

3.6.([merkredo]) escepte 15.00h en "Big Ben" kaj 18.00h kolektiĝo ĉe Wagenbachbrunnen. 18.15h ni ekpromenos tra la urbo por ekkoni ĝin. Maksimume dum 1½ horoj, je ĉiu vetero.

13.6.([sabato]) Ekskurso al Wil por viziti la Esperantoklubon Wil. Detala programo ĉe s-ro Paul Scherer, Adligenstr.1/49 6020 Emmenbrücke, tel: 041/53 46 12.

25.6.20.00h "LUMBILDPRELEGO PRI ROMO". Parolos Franz Brügger.

ESPERANTOKLUBO WIL:

Restoracio Schweizerhof Unt.Bahnhofstr.18.

6.5.20.00h J.Needham: MI NE PAROLOS PRI ELEFANTO.

3.6.20.00h "TUNIZIO" lumbildprelego. Impresoj de ekskurso. Parolos B.S.Pochanke.

13.6.([sabato]) tuttaga ekskurso kun Lucernanoj tra Wil kaj ĉirkaŭaĵo. Ĉiuj Esperantistoj estas bonvenaj. Renkontiĝo ĉe la stacidomo Wil je la 11.00h. Por rezervi tagmanĝon anonciĝu ĉe prezidanto aŭ sekretario.

ESPERANTO-SOCIETO ZUERICH: Informo pri ŝanĝo:
En la ĝenerala kunveno de la 10-a de februaro
1992, la prezidanto, Fritz Liechti, povis trans-
doni la gvidadon de ESZ al nova forto. S-ro D.
Weidmann klarigis sin preta transpreni la prezidi-
dantecon. La prezidinto dankis pro tiu preteco.
En la voĉdonado s-ro Weidmann elektigis unuanime.
La nova adreso de ESZ estas: Esperanto-Societo
Zürich poŝtfako 301 8034 Zürich.

11.5.19.00h MONATA KUNVENO en Karl der Grosse.

La s-roj Mellini kaj Brügger el Lu-
zern gvidos diskutrondon pri ebla
scenaro de enkonduko de Esperanto en
Svislando.

8.6. La MK ne okazos pro pentekostlundo.

Liberaj kunvenoj en kafejo "DOMINO" Seefeldstr/
Wiesenstrasse, ĉiam 18.00h kaj je subaj datoj:
4.5. 18.5. 25.5. 1.6. 15.6. 22.6. kaj 29.6.

ESPERANTO-GESTUDANTOJ ZUERICH:

Ĉiun mardon je la 19.00h, ĉe s-ro Weidmann.

** MEMORIGO AL MIGREMULOJ **

Dum la pentekosta semajnfino, 6-a ĝis 8-a de
junio 92 okazos migrado en ĵuraso, sub gvido de
Claude Gacond. Informoj ĉe KULTURA CENTRO ESPE-
RANTISTA.

KONGRESOJ:

IKUE/KELI-KONGRESO 18-a ĝis 25-a de julio 1992
en Velence, 50 km for de Budapest en direkto al
la Balatono.

UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO [UEA] 25-a de
julio ĝis la 1-a de aŭgusto en Vieno.

INTERNACIA ESPERANTO-KONGRESO por la pli aĝa
generacio, 5.9. ĝis 12.9.92 en Augsburg.

KULTURA CENTRO ESPERANTISTA:

Okazos ĉe KCE sesio de ekzamenoj lingvaj laŭ
ILEI/UEA [int. Ligo de Esperantistaj instruistoj].
Tiel Svisoj povos ekzameniĝi surloke. Temas pri
elementa kaj meza niveloj. La datoj estas: 15-a
16-a kaj 17-a de aŭgusto 1992. Informiĝu kaj ali-
ĝu ĉe KCE poŝtfako 779 2301 La Chaux-de-Fonds.
Telefono: 039/26 74 07. -MG-

ESPERANTO-SOCIETO BASEL: en restoracio Mägd.
22.5.20.00h Monata kunveno: Prelego de s-ro Ga-
cond pri: "40 JAROJ DEDIĈITAJ AL ESPERANTO"
[CELI-KCE-GEP-LINGVISTIKO-DIDAKTIKO].

25.6. Monata kunveno ĉe Chr.Scheidegger en Menz-
lingen.

* * *

SVISA ESPERANTO-SOCIETO

ĜENERALA KUNVENO 1991 OLTEN

PROTOKOLO

Kvardeko da personoj partoprenis la Ĝeneralan Kunvenon de Svisa Esperanto-Societo la 14an de marto 1992, 11h00-12h30, en la konferencejo Emmental, Olten. Sekvas la resumo de la esencaj diskuteroj en la tagordo.

Malfermo

Prezido: Claude **Gacond** (La Chaux-de-Fonds NE), SES-prezidanto. Asisto: Fritz **Liechti** (Zürich), vicprezidanto; Ernst **von May** (Oberuzwil SG), kasisto; Andy E. **Künzli** (Kriens LU), sekretario, protokolanto.

Voĉnombrantoj: Paul **Scherer** (Emmenbrücke LU), Holger **Siebers** (Othmarsingen AG), Ernst **Glättli** (Brugg AG).

Decidojn voĉdonas nur SES-membroj kotizintaj dum 1991 kaj 1992.

a) Protokolo de la antaŭa Ĝenerala Kunveno

Senkome oni unuanime akceptas la protokolon de la Ĝenerala Kunveno en 1991.

b) Raporto de la Centra Komitato (aperinta en 'SES-informas', n-ro 2/92)

- Kiel tuto la jarraporto de la Centra Komitato estas unuanime akceptita. Sekvas kelkaj detalaj klarigoj, diskutoj kaj voĉdonoj.
- La duobla koncepto 'Literatura Foiro' kaj 'SES-informas' estas senkome kaj unuanime akceptita.
- KCE: Mireille **Grosjean** (Les Brenets NE), prezidantino de Kultura Centro Esperantista, anoncas la novan varbafisôn kun la KCE-programo 1992 kaj invitas la ĉeestantojn diskonigi la programon kaj seeble ankaŭ mem partopreni la kursojn. La plej malfacila stagna kaj reorganiza periodo de KCE/GEP pasis, kaj la Centro reprene sian funkciadon, malgraŭ vendado de

domoj. Krom tio KCE havas novan Direktan Komitaton (kolektiva direktoraro) konsistanta el Mireille Grosjean (prezidantino, responsas pri e-lingvokursoj), Andy Künzli (vicprezidanto, asocia kaj kultura vivo), Alain Favre (somera programo), Claude Gacond (pedagogio kaj metodologio de instruado), Nicole Margot (libroservo). Aliaj gravaj kunlaborantoj estas Mario Lépine (librotenado), Benjamine Chaboudez (sekretariado), Ahmed Ameziane (sekretariado, klienta priservado), Sliman Targant (kuirado). Ankaŭ la 'Monata Cirkulero' de KCE denove regule aperas.

- JES: Marion **Grosjean** (Les Brenets), prezidantino de Junularo Esperantista Svislando, donas superrigardon pri la intaj kaj ontaj aktivecoj. Inter alie JES neregule eldonas la bultenon 'La Junaj Esperantistoj Informas'.
- Gazet-artikoloj/Argus/CDELI: Claude **Gacond** dankas al sia patrino, kiu malgraŭ alta aĝo kolektas gazetartikolojn, kaj al Suzanne Gerber, kiu statistikas ilin.
- Venontaj SES-kunsidoj: La kunvoko de la Federa Konsilio de SES estas planita por la 29a de aŭgusto 1992 en La Chaux-de-Fonds (KCE). Claude **Gacond** informas, ke ĝis nun ne alvenis invito por la Ĝenerala Kunveno de SES en 1993.
- Regionaj kulturaj semajnfinoj: Aldone al la renkontiĝoj en Romandio kaj Tiĉino, la lucernaj esperantistoj intencas organizi regionan semajnfinojn en Germanio en novembro 1992.

c) Statut-saĝoj

- Kotizoj (§ 21f): Heinrich **Ringli** (Basel) ne konsentas, ke ankaŭ SES-estraranoj estu liberigitaj pagi membrokotizon. Li proponas, ke tiu regulo koncernu nur la Honorajn Membrojn de SES. Claude **Gacond**, Fritz **Liechti** kaj Andy **Künzli** atentigas pri la dumjara laboro nesalajrita de la Estraranoj favore al la societo kaj proponas, ke kompense ili ĝuu liberigon de la kotizpago. Por la statut-saĝo voĉdonas 34, 1 kontraŭ.
- Konflikto-komisiono (§ 20): la statut-saĝo estas unanime akceptita.
- Ankaŭ la aliaj prezentitaj statut-saĝoj estas unuanime akceptitaj.

ĉ) Financa raporto

Unuanime akceptita kun danko al la kasisto Ernst von May.

d) Raporto de la kaskontrolantoj

Unuanime akceptita kun danko al la kaskontrolantoj Margrit Guldin (Bern) kaj Ernst Glättli.

f) Buĝeto por la jaro 1992

Unuanime akceptita.

Angelo Mellini (Hermetschwil AG) miras, ke en 1991 ne estis elspezita mono por propagando (v. sub diversajoj).

g) Diversajoj

- La ĜK silente memoras la mortintojn Alexander Thaler (Ebnat-Kappel SG), Johann Lutz (Kriens), Paul Enz (Zürich), Maria Grünig (Bern).
- Paul Scherer kritikas, ke dum la UK en Bergen 91 SES ne estis oficiale reprezentita, ekzemple en la inaŭguro. La Estraro kaj CK de SES konstatas, ke Dietrich M. Weidmann (Stein AR), estante komitatano A de SES kaj nomita oficiala reprezentanto de SES dum UK-j, neglektis sian devon. Didi Weidmann klarigas, ke pro alia grava okupo en Usono (Sekvojo-proceso) li estis lastminute malhelpita veturi al Bergen, kvankam li tion intencis. Andy Künzli opinias, ke komitatano A de SES ne nepre devas esti samtempe reprezentanto de SES ekzemple en la UK-inaŭguro. Laŭinterkonsente oni povus nomi ajnan UK-partoprenanton por tiu tasko. Krom tio la A-komitatano ja ne estas devigata iri al la UK, sed tamen antaŭe devas anonci tion ĉe SES kaj UEA kaj nomi taŭgan anstataŭanton.
- Mireille Grosjean anoncas la starigon de KCE-budo dum la UK Vieno.
- Andy Künzli respondante al Angelo Mellini, kiu rimarkis, ke SES ne elspezis monon por propagando en 1991, klarigas, ke SES intencas ĉijare reldoni aktualigitan flugfolion seeble en la germana, franca kaj itala lingvoj. Li mem okupigos pri la germanlingva eldono, kunlaborante kun fakuloj. La sugeston de Didi Weidmann eldoni tian folion ankaŭ en la romanca lingvo li nuntempe ne trovas necesa.
- Didi Weidmann menciante la intencon de Svisa Radio Internacia (SRI Berno) ĉesigi la esperanto-elsendojn sendis protestleteron al unu el la ĉefaj funkciuloj de la radio. Claude Gacond kaj Andy Künzli, redaktoroj de la esperanto-elsendoj,

emfazas siajn penojn en iu formo daŭrigi la esperanto-produktadon, sed samtempe admonas, ke privatuloj ne sendu leterojn al unuopaj estroj de SRI. Tio nur komplikas la jam streĉitan situacion. Andy **Künzli** alvokas la ĉeestantojn sendi leterojn al la adreso de la radio mem kun la peto daŭrigi la kurtondajn elsendojn (Svisa Radio Internacia, esperanto-fako, 3000 Bern 15). Ĉikoncerna artikolo aperas antaŭvideble en 'Esperanto' (UEA), februaro 1992.

- Didi **Weidmann** varbas por siaj novaj iniciatoj: Pertelefona 'Esperanto Infofon' (n-ro 156-5434), studvojaĝo al Kubo '92 kaj lernolibro 'Esperanto por mondĉivitanoj'.
- Andy **Künzli**, lanĉinto de la ideo organizi Universalan Kongreson en Svislando en la jaro 2000, anoncas, ke li serĉos taŭgajn kunlaborantojn (estontajn LKK-anojn) inter la SES-anoj por tiu celo.
- Andy **Künzli** dezirante ankaŭ akceli la eldonagadon de SES, intencas kolekti biografiojn pri svisaj esperantistoj cele al la estonta eldono de ampleksa 'Leksikono de svisaj esperantistoj' laŭ la jugoslavia modelo (Gjivoje 85).
- Ernst **Glättli** ĝuis la agrablan esperantistan etoson dum la ĜK; li ankaŭ ĝojas, ke KCE refunkcias sed bedaŭras, ke malmultaj ĝejunuloj partoprenas la ĜK. Li alvokas al monkontribuoj por JES (post la ĜK kolektigas pli ol CHF 200.-).

Programeroj ekster la Ĝenerala Kunveno

- Dum la tuta tago funkciis la libroservo de KCE. Laŭ la klarigo de Nicole **Margot** (Lausanne), nova estrino de la libroservo, kiu ankaŭ prezentis i.a. novan esperanto-kasedon (Handzlik), oni povis vendi kontentigan kvanton da libroj.
- Post la Ĝenerala Kunveno Claude **Gacond** rakontis pri sia 40-jara aktiveco kiel esperantisto. La prelegon akompanis lumbildoj. Andy **Künzli** dankis kaj gratulis lin en la nomo de la CK kaj de la svisa esperantistaro transdonante simbolan donaceton.
- Alia grupo partoprenis urbekskurson gviditan de Marion **Grosjean**. Pro la pluva vetero aliĝis bedaŭrine nur malmultaj personoj.

G R A V E !

Noto pri la mangoj:

Ĉijare SES unuafoje devis antaŭmendi la menuojn ĉe la partoprenontoj de la ĜK, kiujn oni servis en la restoracio Emmental, per aligilo aperinta en 'SES-informas'. La restoracio rifuzis surlokan mendadon, se estas pli ol 20 personoj. Fakte temis pri eksperimento, kiu nur parte sukcesis. Kvankam oni havis sufiĉe multe da tempo por sendi la slipon al la sekretario de SES, li ne ricevis la aligilojn de ĉiuj partoprenantoj. Povas esti, ke ne ĉiuj partoprenontoj atentis la aligilon. Aliflanke, iom ĝenis la lastminuta kaj surloka mendado de menuoj kaj ankaŭ la neapero de kelkaj aligintoj, kies senkulpigon oni eksciis nur surloke. Tio kaŭzis, ke surloke oni devis krommendi aŭ malmendi plurajn porciojn, kio en si mem ne estis problema. Pli komplika estis la cirkonstanco, ke la antaŭaliga procezo estis komplete renversita kaj ke ekzemple menditaj menuoj finfine ne estis necesaj.

Por estonte eviti tian konfuzon kaj por pli glate organizi tiun aspekton de la Ĝenerala Kunveno, la CK planas dissendi aligilon kun enpagilo, kio devigos la partoprenantojn definitive aliĝi kun antaŭpago de la tuta sumo por la menuo (inkl. supon, salaton, kafon kaj deserton; trinkaĵoj aparte). Por partoprenontoj, kiuj ne anticipe aliĝas, sed nur surloke, oni ne povos garantii menuon kadre de la ĝenerala priservado. Se tamen eblas aliĝi, tiukaze nur kontraŭ pli alta pago.

Krom tio, oni estonte mendos nur du menuspecojn: unu nevegetara kaj unu vegetara. Ĉijare aldone komplikis la mendon de la menuoj la ŝanĝigo de la estraro de la konferencejo Emmental, dum 'SES-informas' jam publikigis la aligilon. La nova hotelestro havis alian menuokoncepton, sed tamen pretis kuiru por ni la menditajn menuojn. (AEK)

* * *

KULTURA CENTRO ESPERANTISTA:

"G r a v a p a r t o d e E s p e r a n t u j o"
Venu

esperantiĝi - progresi - esperantumi - kongresi -

Rigardu nian riĉan programon! Aliĝu tuj!

PF 779 2301 La Chaux-de-Fonds Tel: 039/26 74 07.

D-RO GIORGIO SILFER:
POZITIVA EVOLUO SPITE AL LA KONSERVATIVA SILENTO

Giorgio Silfer [1949] estas unu el la plej elstaraj figuroj de la moderna Esperanta komunumo. Dufoje doktoriĝis pri interlingvistiko, aŭtoro de ses libroj kaj multaj sociologiaj esploroj. Prezidanto de la Kooperativo de Literatura Foiro. Unu el la iniciatintoj de la Manifesto de Raŭmo, kiu signis la trajtojn de la nova epoko por Esperanto. Motivo por ĉi-intervjuo estis la okazon-ta en Vraca fine de junio de 1992 Internacia Literatura Forumo. Tiu intervjuo estas ege aktuala, ĉar tuŝas problemojn de la evoluigo de Bulgara Esperanto-Asocio.

Ljubomir Trifonĉovski: Pli ol dek jaroj pasis post la Manifesto de Raŭmo. Ĉu dum tiu-ĉi tempo io ŝanĝiĝis kaj jam ne estas bezonata nova tia fundamenta dokumento ?

D-ro Silfer: La Manifesto de Raŭmo estis Lanĉita la 1-an de aŭgusto 1980. Ĝi ne estas dokumento oficiala de iu kongreso, sed dokumento, kiu pri-skribas la opinion de ĝiaj subskribintoj. En si mem la Manifesto estas tre mallonga skizo pri diversaj ideoj maturiĝintaj jam en la sepdekaj jaroj. Tiuj ideoj trovis redifinon kaj plilarĝigon per postaj dokumentoj, ekzemple la deklaro de Pola Studenta Esperanto-komitato, la studoj de Sandor Revesz kaj Jerzy Leyk. Kaj krome, per pliaj konferencoj pri strategiaj demandoj de Esperanto-komunumo; almenaŭ mi menciu du: en Varsovio en 1984 kaj en Szeged en 1988. Do entute paroli pri la Manifesto de Raŭmo ne tiel trafas, ĉar ĝi estas kvazaŭ punkto de fluanta rivero: estis ellaborado pli frue, ekzemple en kultur-politikaj raportoj de "Literatura Foiro", kaj densa ellaborado poste. Mi opinias, ke tio estas ĝusta takso pri la situacio dum la okdekaj jaroj. Ili entute alportis novan dimension. Kaj efektive nun, en 1991, mi povas diri, ke kelkaj gravaj ŝanĝoj realiĝis. Ili ne estas tiel radikalaj kaj ekskluzivaj, aŭ absolutaj, por malpermesi la ekziston de aliaj konceptoj. Ŝanĝiĝis, ekzemple, la bildo de Esperantio. Ĝis

Raŭmo praktike mi konis nur unu: Esperantio estis iu propaganda movado, aŭ almenaŭ iu premgrupo (ĝi ne estis amasmovado, ĉar la dimensioj neniam estis tiel grandaj), kiu simple iris al la mondo por konvinki ĝin pri la ekzisto de iu utila filantropaĵo aŭ genia teknologia trovaĵo. Ni volis konvinki la mondon, ke Esperanto estas la solvo de iu terura problemo - la monda lingva problemo, pri kiu malmultaj konsciis ĝenerale. Ni volis aliri instituciojn, konvinki registarojn, aŭtoritatojn por poste eventuale tra lernejo devige enkonduki la instruadon de Esperanto. La ideo estis ke iam la esperantistaro fariĝos majoritato en la mondo. Aŭ ke Esperanto fariĝos efektive dua lingvo por ĉiuj. Tiu slogano, kiu estis kontestita ĝuste kadre ke la Manifesto de Raŭmo, ne taŭgas por klarigi la novan bildon sociologian. Hodiaŭ Esperantio havas ankaŭ alian dimension. Oni komencas koncepti la esperantistaron ne nur kiel disciplinitan movadon, kiu devas konkuri la mondon, sed ankaŭ kiel komunumon, funkciantan plimalpli kiel disa minoritato tra la mondo. Tia diasporo, kiel disa minoritato, havas unu ĉefan komunan referencon en la lingvo, en la komuna lingvo, en Esperanto. Do, estas profunda modifo de la sociologia bildo de Esperantio. La raŭmismo opinias, ke la esperantistaro restos minoritato dum longa tempo. Oni ne scias, kiom da tempo, sed sendube tre, tre tre longe. Cetere, ne estas eble indiki movadon, kiu fariĝis majoritato; eĉ la kristanismo ne havas majoritaton en la mondo. Do nenio vere konkeras la mondon iam, krom se ĝi respondas al iu baza fundamenta bezono. Kaj certe la bezono pri komunikado ekzistas, sed la kontentigo, kiun donas Esperanto, estas iu aparta kontentigo. Homo, kiu lernas anglan, aŭ francan, aŭ germanan, plenumas certan bezonon de komunikado, ekzemple sur profesia nivelo, sed ne plenumas la transnacion bezonon de komunikado, kiun eblas realigi pere de Esperanto. Esperanto estas la lingvo, kiu permesas rekte kaj profunde alparoli la homon kaj ne nur la kelneron en la restoracio aŭ la kontiston en la hotelo. Do en tiu ĉi dimensio ĉio ŝanĝiĝas. Evidente la bazaj bezonoj de la esperantistoj, komprenataj kiel premgrupo, propaganda movado, estas tute aliaj ol la bazaj bezonoj, kiujn havas

la esperantistoj, komprenataj kiel minoritato diaspora tra la mondo. Por konkludi: se la esperantistaro devas esti konceptata unuavice kiel propaganda movado, la homoj devas esti objekto en tiu movado. Ili estas unuavice plia unuo, kiu aliĝas por propagandi mem, por instruadi, por realigi disvastigon de la lingvo kvante. Se, male, Esperantio estas konsiderata kiel komunumo, la akcento estas donata al la bezonoj de tiu komunumo, do al la bezonoj de ĝia kresko el kvalita vidpunkto kaj el kvanta vidpunkto. Tiam la novaj membroj de tiu komunumo estas ne objekto, sed subjekto. La homo, kiu aliĝas al tiu komunumo, ne venas, ĉar ni bezonas tute simple iun plian homon, sed ĉar ni bezonas iun plian homon, kiu vivu nian kulturmodelon. Estas tiu la esenca diferenco ĝuste inter la konservativa linio kaj la raŭmismo. En la konservativa linio la ideo estas, ke ni devas esti pli multaj, ĉar ju pli multaj ni estas, des pli forte ni povas premi. El la raŭmismo ideo ni devas esti pli multaj, ĉar ju pli multaj ni estas, des pli multaj vivas nian vivmodelon, nian kulturmodelon. Konklude al via duobla demando, mi opinias, ke oni ne povas diri, ĉu necesas novaj dokumentoj, ĉar la bezonoj de novaj dokumentoj troviĝas per si mem. Mi opinias, ke dum la okdekaj jaroj, en la fazo de pura teorio, multo estas sufiĉe el-laborita, do ni devas en fazo multe pli praktika produkti nome tiujn servojn, tiujn varojn, kiuj utilas por altigi la kvaliton.

Ljubomir Trifonĉovski:

Post Raŭmo oni ekparolis pri novtipaj organizoj de Esperantokomunumo, tamen evidentiĝas, ke la Kooperativo de Literatura Foiro restas la sola novtipa organizo. Ĉu tio ne faras de vi pesimisto ?

D-ro Giorgio Silfer:

Mi opinias, ke vi troigas la virton kaj la ekskluzivecon de la Kooperativo de Literatura Foiro. Kiam temas pri novtipaj organizoj, ni devas interpreti tion en almenaŭ du manieroj. Unue tiuj organizaĵoj, kiuj ne rekte ligiĝas al la trunka movado propaganda, konservativa kaj even-

tuale pracula. Ekzemple, la diversaj aŭtonomaj kulturcentroj, kiuj naskiĝis precipe ekde 1978, kiel Kultura Centro Esperantista. La kvinpetalo, La Vojnodo, la centro en Poprad, kiuj plenumas du bezonojn de la Esperanto-komunumo - la perfektigo en la lingvo. Ili estas kvazaŭ havenoj por la Esperanto-insularo. Tiuj centroj estas efektiva novaĵo, kiu ne ekzistis pli frue, se escepti la realaĵon de Greziljono kaj la forpasintan realaĵon de Primoŝteno. Do tio estas la unua aspekto. Alia aspekto, grava en tiuj novtipaj organizoj, estas la strukturo. Ĝis nun oni insistis pri strukturo laŭ funkcioj - bazita sur la hierarkia akso: ke ekzistu piramido kun bazo de lokaj kluboj kaj aktivuloj, interna bazo de naciaj societoj aŭ teritoriaj organizaĵoj kaj pinto kun tutmondaj organizaĵoj [fakte du ekzistas - Universala Esperanto-Asocio kaj Sennacieca Asocio Tutmonda]. Montriĝas, ke iom post iom realiĝas nova koncepto, nepiramida, sed, se vi volas resti en la kampo de solida geometrio, sfera. La bazo ne estas submetita al iu verto hierarkia, sed kvazaŭ reto kovras tiun sferon, eventuale egaldistancon de iu centro, kiu utilas ne por ordoni, sed por kunordigi kaj konsili. En certa maniero, en certa mezuro, la Kooperativo de Literatura Foiro plenumas tiun ĉi tipon de organizado, sed ĝi ja ne estas sola - ekzistas aliaj establoj en Esperantio, kiuj pli kaj pli preferas la retan sistemon, preferas la lozan konfederacion al la centralismo, kiu karakterizis kaj pli karakterizas Universalan Esperanto-Asociacion tra Lapenna unuavice, kaj post Lapenna - en la lapenismo sen Lapenna.

Ljubomir Trifonĉovski:

La Esperanto-organizoj en la orienteŭropaj landoj serĉas sian lokon en la demokratiaj procezoj de siaj propraj landoj. Tamen, la ŝanĝiĝo malrapidas: iuj fiaskis, aliaj kolapsas. Ĉu tio estas rezulto de renaskiĝo aŭ de ties morto? Aŭ ili alproksimiĝas al novtipeco, aŭ male?

D-ro Giorgio Silfer:

La evoluo en Orienta Eŭropo ĝenerale estis ĉiam

pli pozitiva ol en Okcidento. Nehazarde ĝuste en Orienta Eŭropo Naskiĝis Esperanto mem. Nehazarde la ĉefaj teorigoj de la raŭmismo estis homoj kiel Jerzy Leyk - polo, Sandor Revesz - hungaro, la konferencoj en 1984 kaj en 1988 okazis respektive en Varsovio, Pollando kaj Szeged, Hungario. Do, ĉiukaze rilate la ŝanĝon, la evoluon al novtipa organizado, Orienta Eŭropo estis, laŭ mi, pli preta kaj pli matura ol la Okcidenteŭropa praela esperantistaro. Nun venis 1989, la tiel nomata "annus mirabilis" (jaro mirinda), kiam je makrosocia nivelo realiĝis certaj transformoj, influantaj ankaŭ je mikrosocia nivelo. Sed ni ne forgesu, ke jam pli frue estis eksperimentoj - plej grava verŝajne tiu de Pola Esperanto-Asocio en 1981-1984. Ĝi finiĝis per interveno de la ŝtataj instancoj, vokita de esperantistoj, kiuj kontraŭis tiun novan kurson. Mi opinias, ke ni devas komenci fakte de tie, kie ĉesis la eksperimento de Pola Esperanto-Asocio en 1984. La ekzemplo, la modelo, kiun oni povas sekvi, estas ĝuste tiu, de la jaroj, kiam Jerzy Leyk estis prezidanto de Pola Esperanto-Asocio. Alia ekzemplo, sugestita jam plurfoje, kiun oni povas sekvi, estas la sendependiĝo de la diversaj servoj, kiujn mastrumas unu sola asocio. Tiel ili povus multe pli prosperi kaj progresi ol en centralizita movado. Super ĉio ĉi estas la granda demando, kio okazos en Orienta Eŭropo? Sed mi opinias, ke kiel ajn evoluos la makrosociaj cirkonstancoj, en Orienta Eŭropo ekzistas tiel forta tradicio de Esperanto, ke Orienta Eŭropo restos ĉiam verŝajne la plej grava parto ene de la Esperanto-komunumo tutmonda. Kaj ankaŭ en tio mi estas sufiĉe optimisma.

Ljubomir Trifonĉovski:

Ĉu eliroj de la problemoj por la Esperanto-komunumoj en la Orienteŭropaj landoj ne estas ekzisto de alternativaj Esperanto-organizaĵoj novtipaj, kiuj donos pli da eblecoj por la esperantistoj en tiuj landoj?

D-ro Giorgio Silfer: Do parte mi respondis, kiam mi aludis pri la eblo ke diversaj servoj

fariĝu memstaraj. Sed la ideo ne estas multigi la organizojn, ĉar tio povus esti malsano de la esperantistoj: kiam ili havas ion novan, ion konkretan, ili ne kapablas alimaniere plenumi sian celon ol fondi novan asocion. Ekzemple la bibliotekistoj en Esperantio fondis sian interhacian asocion kun la klasika duobla celo: unuflanke propagandi Esperanton inter la bibliotekistoj kaj la bibliotekoj, aliflanke plenumi iun rolon de faka terminologia laboro pri la bibliotekonomio. Mi opinias, ke tio estas mispaŝo. Pli moderna sinteno estas, ke tiuj bibliotekistoj, kiuj estas esperantistoj, kunigu sian forton por plenumi iun precizan projekton. Ekzemple ĝis nun mankas katalogo ĉiujara; kiu enhavus detalan liston de la libroj, eldonitaj en Esperantio en la koncerna jaro. Tiu katalogo ekzistas en ĉiu lando; en Svislando estas la tiel nomata "Svisa libro" en pluraj lingvoj, ĉar la lando estas plurlingva. Devus aperi iu katalogo titolita "La Esperanto-libro" - por 1990, 1991 ktp... Kaj tion povus plenumi ĝuste kiel projekton la bibliotekistoj. Kiam tiu projekto estos plenumita, unu afero estos en ordo. Por esti vere novtipa organizaĵo, necesas labori laŭ projekto, pli ol laŭ funkcio, necesas doni al si iun specifan celon. Homoj kolektiĝas por plenumi celon kaj kiam ĝi estas plenumita, la taskoforto estas libera por aliaj celoj.

Ljubomir Trifonĉovski:

En Orienta Eŭropo draste senteblas manko de novaj kompetentuloj en la diversaj kampoj de Esperanto-kulturo. De alia flanko la Kooperativo de Literatura Foiro, kiel novtipa organizo, speciale zorgas pri solvo de tiu problemo. Kiamaniere vi komentis mian aserton?

D-ro Giorgio Silfer:

La problemo ne estas specife Orienteŭropa. Mi eĉ dirus, ke en Okcidenta Eŭropo povas ekzisti pli forta problemo ol en la Orienta. Se vi konsideras, kiuj estas kelkaj novaj nomoj de intelektuloj - simple vi trafoliumu la lastajn kolektojn de "Literatura Foiro" aŭ la lastajn numerojn por trovi ekzemplojn - vi vidos, ke aperas nomoj kiel Istvan Ertl, Blazio Vaha, Woj-

tech Usakiewicz, vi, Julian Modest - homoj el Orienta Eŭropo, dum el Okcidenta Eŭropo la junuloj aŭ homoj sub kvardekjara aĝo ne estas tiom multenombraj - vi trovos Herbert Mayer, Georgo Kamaço, Andy Künzli. Multaj, kiuj aktivas en Sovetunio - Aleksandr Fjodorov. Aleksandr Korĵenkov, Nikolaj Lozgaĉev ktp, estas intelektuloj kaj esperantologoj. La problemo estas kiel influigi ĉi tiujn homojn al Okcidento kaj kiel interrilatigi ilin pli ofte. Kelkaj landoj estas malpli bonŝancaj. Povas esti ankaŭ la kazo de Bulgario, kie klopodoj, signoj kaj diversaj simptomoj lastatempaj donas impreson, ke ankaŭ ĉe vi estas iu esperiga evoluprocezo.

-El Bulgara Esperantisto, decembro 1991-

* * *

SVISA ESPERANTO-SOCIETO

CENTRA KOMITATO (CK)

ESTRARO

Prezidanto:

s-ro Claude GACOND, Chevreuils 14, CH-2300 La Chaux-de-Fonds (NE). Tel. (039) 26 52 32.

Unua vicprezidanto kaj ĉefredaktoro de "SES-informas":

s-ro Fritz LIECHTI, Wiesliacher 17, 8053 Zürich. Tel. (01) 53 77 13.

Sekretario:

s-ro Andy E. KÜNZLI, Zumhofstrasse 22, 6010 Kriens (LU). Tel. (041) 45 55 83.

Kasisto:

s-ro Ernst VON MAY, Flurstrasse 3, 9242 Oberuzwil (SG). Tel. (037) 51 61 30.

ALELEKTITAJ CK-anoj

Regionaj vicprezidantoj:

Germanlingva: s-ro Angelo MELLINI; Büntacher 21, 5626 Hermetschwil (AG). Tel. (057) 33 33 85. Oficejo Lucerno: (041) 57 01 11.

Franclingva: f-ino Nicole MARGOT; 28, ch. Tour-Grise, 1007 Lausanne (VD). Tel. (021) 24 11 93.

Itallingva: d-ro Tazio CARLEVARO; Viale Giuseppe Motta 32, 6500 Bellinzona (TI). Tel. (092) 25 29 88.

Ceteraj komitatanoj:

s-ino Mireille GROSJEAN-ROBERT, 20, rue du Temple, 2426 Les Brenets (NE). Tel. (039) 32 18 88. (Ligo kun GEP/KCE).

f-ino Marion GROSJEAN; 20, rue du Temple, 2426 Les Brenets (NE). Tel. (029) 32 18 88. (Junularo)

s-ro Fritz WASSMANN; Uettligenstr. 16A, 3033 Wohlen (BE). Tel. 031 82 27 55. (Eksteraj rilatoj, ekologio)

POR MUZIKEMULOJ

La "Schubertiades" estas fama renkontiĝo primuzika en Romandio. Ĝin organizas la dua programo de la romandia radio. Ĝi jam okazis en Estavayer, Morges, La Neuveville kaj aliaj urboj.

"SCHUBERTIADES" okazos je la 5-a kaj 6-a de septembro 1992 en La Chaux - de - Fonds.

Kio estas "Schubertiades"?

Estas renkontiĝo ŝubertstila, tio estas muzikludado ekstere en familia etoso. Schubert ofte muzikumis en ĝardeno, invitis geamikojn kaj okazigis viglan "jam-session", tio estas improvizata kunludado.

La radio romandia organizas en la Chaux-de-Fonds plurajn koncertojn dum 2 tagoj, ĉu sur placoj, ĉu en ĝardenoj, ĉu en kortoj, ankaŭ en preĝejoj kaj koncertejoj. Estas planataj koncertoj fare de grandaj orkestroj, korusoj, pli etaj grupoj, kvartetoj ktp. Oni aŭdos ne nur verkojn de Schubert, sed ankaŭ de aliaj romantikismaj komponistoj kiel Mendelsohn, Schumann k.a. aŭ eĉ Bach kaj Mozart. En kazo de pluvo staros tendoj.

* KCE ĝojos gastigi la geaŭskultantojn inter *
* sabato kaj dimanĉo. *
* * *

Ĉar estos centoj da muzikemuloj surloke, kuraĝaj esperantistoj eble decidus promeni sur-

strate kiel sandviĉohomoj, portante francling-
vajn sloganojn kiel:

"MUZIKO KAJ ESPERANTO: DU INTERNACIAJ LINGVOJ"

aŭ
"PER MUZIKO EBLAS DIRI: MI AMAS VIN" aŭ

"MI ESTAS TRISTA", sed kiel vi diras pere de
muziko: "KIE ESTAS LA STACIDOMO"?

"PLI BONE VI UZU ESPERANTON"

Volontuloj anoncu sin ĉe Mireille Grosjean,
Les Brenets.

* * *

RENKONTIĜOJ ANTAŬvidataj en 1992

BELLINZONA:

1. Turisma kaj marŝa semajnfino en Airolo: Vi-
zito de vizitindaĵoj, kaj marŝo tra supra
Leventina valo, kun vizito de lokaj muzeoj.
Loko: Hotelo INNOVACANZA en Airolo.

Kosto: tranokto kaj matenmanĝo Fr. 40.-

Dato: 12-a ĝis 13-a de septembro 1992. Por
sportemuloj.

2. KULTURA SEMAJNFINO ESPERANTISTA, de la 5-a
ĝis la 6-a de decembro 1992. Temo:

"ESPERANTO POST LA OKCIDENTIĜO, KIO POSTE"?

Loko: Lugano, ĉe Scuola-Circolo Migros.

LAUSANNE: REGIONA SEMAJNFINO je la 26-a kaj
27-a de septembro 1992.

Temo: "EŬROPA KOMUNUMO"

LUZERN: En esplorado. Dato ankoraŭ nekonata.

* * *

LASTMOMENTA INFORMO

AL LA ESPERANTISTARO DE SVISLANDO:

Post teknika paŭzo la ESPERANTO-INFONO sub la
telefonnumero 156 54 34 refunkcios la 24-an de
aprilo 1992. Pli detala informo en la venonta
numero de "SI".

-DW-

* * *

ESPERANTO EN RADIO

MERKATO DIFINAS ANKAŬ SVISAN RADIION INTERNACIAN

Lastatempe diversaj onidiroj pri la malapero de Esperanto el la programoj de Svisa Radio Internacia (SRI), Berno) maltrankviligis ne nur la produktistojn de la elsendoj, sed ankaŭ multajn klientojn, t.e. aŭskultantojn de tiu radiostacio. Nun ni scias: Esperanto ja malaperos de la kurtundoj, sed estas antaŭvidite konservi ĝin kiel "produkto-lingvon" de SRI, tamen en alia - eble eĉ pli alloga - formo. Necesas iom rakonti la historion kaj la aktualan fonon de ĉio tio.

La Esperanto-disaŭdigoj de Svisa Radio Internacia komenciĝis vintre de 1946/47. Tiam Edmond Privat (1889-1962), mem kunfondinto de Radio Ĝenevo, ricevis la komision ekprodukti elsendojn en la internacia lingvo. Tre bonvena por la nova



Edmond Privat

SRI-radio-eksperimento montriĝis ankaŭ la 32-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu en 1947 okazis en Berno. Produkti ĉiutagan kongresraporton oni petis de d-ro Arthur Baur, tiam profesia ĵurnalisto. La reagoj al tiu provo estis tiom kuraĝigaj, ke Baur ricevis la taskon redakti, apud Privat, pluajn disaŭdigojn ekde oktobro 1947 en la tempodaŭro de po kvin minutoj. Ekde tiam Esperanto elsendiĝis regule ĝis hodiaŭ (kun escepto en 1964/65, kiam la direkcio de SRI anoncis ĉespremon). Post la morto de Privat en 1962 liaj elsendoj estis transprenitaj de Claude Gacond (1931-), kiu kun sia edzino Andrée prizorgis la ĵaŭdajn elsendojn, dum Baur, apogata de sia edzino Heidi, daŭrigis la lundan programon. En 1986 aliĝis al la kvaropo Andy Künzli (1962-), kiu pretigis pli kaj pli da disaŭdigoj (sabataj) kun plej diversa enhavo, lastatempe precipe svisa. Fine de 1991, Künzli estis nomumita posteulo de Baur, kiu meritoplene ĉesigis sian longan funkciadon ĉe SRI [vd. Esperanto, julio-aŭgusto 1991, p. 156].

Ankaŭ ĉe SRI oni opinias ke la tradicio estas

bona, sed SRI, kiel multaj aliaj entreprenoj en Svislando, devas draste limigi sian buĝeton, ĉar la svisa ŝtato forstrekas 20% de la subvencioj. Tial ĝi restrukturas siajn programojn, laŭ jenaj prioritatoj: la plej grava tasko de SRI estos servi la svisojn vivantajn en eksterlando, en la dua vico sekvas la tasko "renomigi Svislandon en eksterlando", kaj kiel trian taskon SRI antaŭvidas la "dialogon kun eksterlando". Alivorte: SRI ne havos tiom da rimedoj kaj eblecoj, kaj krom tio ĝi dependos de la svisa politiko mem. Se la svisoj decidus malfermi la landon al Eŭropo kaj al la mondo, tiukaze SRI eble ludos pli gravan rolon. Se ili decidus inverse, tiam SRI restos ne-glektindaĵo.



Arthur Baur

Por la lingvopolitiko de SRI, kiu ĝis nun elsendis en naŭ lingvoj, tio signifos i.a. rezignon pri la portugala, kiu ŝajne perdis sian allogon en portugallingvaj regionoj. Kion pri Esperanto? Ĝi ja ne perdis sian aktualecon kaj allogon ĉe la esperantistaro - eĉ tute male - sed ankaŭ ĝi malaperu de la kurt-ondoj kaj estu pelita en la t.n. "diversigan sektoron", kiel la SRI-planistoj nomas tiun kategorion de programoj. Tiu ĉi sektoro antaŭvidas la produktadon de laŭbezonaj radioprogramoj.

Se ni baziĝas sur la supozo ke Esperanto estos daŭre uzata de SRI, tiukaze mi opinias ke ĝin savis tri ĉefaj faktoroj: a) la koncilio de la direktoro de SRI pri la signifo de la internacia

lingvo kaj la bonvolo de SRI konservi tiun "belan, kulturen ekskluzivaĵon (laŭ direktoro R. Oppenheim); b) la fidelaj aŭskultantoj kaj respondantoj (3% el la tuta SRI-korespondantaĵaro koncernas Esperanton.

Kompare kun la aliaj lingvoj de SRI, kiuj ĝis nun povis disponi multe pli

ampleksan disaŭdigo-tempon ol Esperanto, tiu ĉi cifero estas tre alta; c) la kompetenteco de la Esperanto-

produktistoj (Oppenheim: "ili vere havas fakan scipovon") kaj la trafa enhavo de iliaj elsendoj (kiu cetere tute

konformas al la komisiona donita de la svisa registaro]. Krome helpis certe ankaŭ detala "defenda" raporto de Gacond kaj Künzli, kiu trafe pravigis la ĝisnunan ekzistadon de la Esperantoprogramo kaj la neceson daŭrigi la disaŭdigojn.



Claude Gacond

Kio do restos de Esperanto? La SRI-planistoj kaj la Esperanto-redaktoroj estas kune ellaborantaj novan koncepton, kies ĉefajn trajtojn eblas priskribi jene: la Esperanto-produktoj, kiuj certe enhave ne tro ŝanĝiĝu [devos okazi vera koncentriĝo sur svisaj temoj], estonte pli celtrafe ol ĝis nun direktiĝu al la publiko kiu deziras aŭdi ilin. Unuopuloj kaj Esperanto-grupoj havos la eblon akiri kasedon [laŭ kostokovra maniero, eble en formo de abono] kun monata programo, kaj la Esperanto-produktoj estos perataj ankaŭ al aliaj radiostacioj kiuj disaŭdigas en la internacia lingvo, aŭ al regionaj [privataj] radiostacioj kiuj pretus transpreni kompletajn Esperanto-programojn aŭ partojn de ili. Tiel, la esperantistoj ricevus la eblon aŭdi nin tra siaj lokaj radiostacioj. La SRI-planistoj jam informis, ke aro da tiaj radiostacioj anoncis sian interenson kunlabori kun SRI.



Andy Künzli

Certe la perdo de la svisa kurt-ondo por Esperanto estas bedaŭrinda novaĵo. Samtempe mi kredas, ke la nova koncepto, kiu donos pli fortan pezon al la kasedoservo, malfermos ankaŭ novajn eblojn kaj vastigos la Esperanto-publikon, kiu ŝatus posedi konserveblajn son-dokumentojn en Esperanto-societoj. Mi esperas ke ni trovos solvon akcepteblan por la Esperanto-oubliko. Tio dependos de la intereso de ĝi. Se la reagoj kaj mendoj montriĝos tro magraj, malaperos verŝajne la lasta espero konservi Esperanton ĉe SRI.

Pliajn komunikojn kaj la konkretan oferton de SRI ni publikigos en la Esperanto-gazetaro. Interesatoj regule ricevi kasedon jam skribu al: Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15, Svislando. Ni antaŭĝojas ricevi viajn komentojn, sugestojn, kaj eble ankaŭ mendojn.

Andy E. Künzli [Svislando]

* * *

MORTANONCO

La 10-an de marto 1992 mortis, 60-jaraĝa, s-ino Helga Nüesch, edzino de nia longjara membro Willy Nüesch, Belpstrasse 19 3007 Bern. Ni esprimas al s-ro Nüesch nian plej sinceran kondolencon.

-SVISA ESPERANTO-SOCIETO-

Redaktfino de "SES INFORMAS" n-ro 4/92 estas la 15-a de junio 1992.